

Numero: 314.  
Julio: 2018.

26-a jarkolekto

# VESPERTO

## Literaturaj folioj



Redaktanto  
Apáti Kovács Béla  
Kaposvár, Béla király u. 44. HU-7400  
Telefona: 06/20/497-03-64  
Re tadsreso: [apatikb111@gmail.com](mailto:apatikb111@gmail.com)  
Eldonanto: KAPOŠVARA ESPERANTIO -CENTRO  
Lingve kontrolis: Erzsébet Tu boly

# Saluton somero!

Ĉiu somero estas simila. Aŭ ne?

Fakte la temperaturo estas varma, eĉ varmega. La homoj ferias, ĝuas la sunradiojn. Multaj vojaĝas al riveroj, lagoj aŭ maroj por refreŝiĝi.

La someraj tagoj estas longaj kaj nur malfrue komenciĝas malheliĝi.

Tiuj ĉi tri monatoj ĉarmas la homojn kaj ni sentas nin libera.

La somero eble estas la plej bona sezono.

Ĉu vi pensas pri homoj, kiuj ne povas ferii somere kaj ili devas labori de mateno ĝis vespero dume la sunradioj bruligas ilian haŭton?

Tiuj homoj rikoltas grenon sur polva kaj varmega kampo por ke ni havu panon. Sen ilia laboro de sur nia tablo mankus tiu ĉi grava manĝaĵo.

Ne forgesiĝu pri ili, kiam vi kuŝas nenionfarante sur la marbordo aŭ sorbetadas glacian bieron en malvarmeta biermejo.

Ili ofertas siajn somerajn tagojn por ni kaj laboras por ke ni havu panon ankaŭ en la sekva jaro.

Nun estas somere kaj ni ripozas. Tiel estas bone.

Nur la terkulturistoj laboras sur varmega grenkampo.

Ni estimu ilian laboron kaj ni estu dankemaj al ili

Dum vi ferias kaj ripozas, ili laboras. Ilia laboro estas tre grava.

Pano estas mem la vivo. Tiun ĉi praan manĝaĵon ni konsumas preskaŭ ĉiutage. Sen ĝi nia nutrado estus pli malriĉa.

Ni goju, ke ekzistas homoj, kiuj laboras por ni ankaŭ en la plej varmaj monatoj.

Somero estu por ili iom indulgema kaj foje – foje sendu al grenkampoj refreŝigan venton kaj kovru la ĉielon per mola nuboj. Sed evitu la tempeston kaj pluvegon, kiuj malfaciligas ilian laboron.

— Redaktanto —



# Amo estas la plej bona lingvoinstruisto

La knabino ne parolis la lokan lingvon. Ŝi estis eksterlandano. Antaŭ du semajnoj ŝi alvenis al la urbo. Ŝi sciis eĉ unu vorton.

Komence la komunikado estis tre malfacila. Ŝi apenaŭ povis komprenigi sin. Vane ŝi havis vortaron. Ŝi ne povis uzi ĝin.

En la urbo estis belulo, kiu jam en la unua momento komencis amindumi al la knabino.

— Mi volonte helpas al vi – li diris kare. El kio ŝi komprenis nenion. Ŝi strange rigardis al li.

Ŝi montris per siaj manoj, ke ŝi komprenas nenion.

— Mi helpas al vi – li ripetis ridetante. — Mi instruas al vi la lokan lingvon.

— Ĉu loka lingvo? Mi ne kompreni – balbutis la knabino.

— Mi estos via instruisto kaj pere de mia helpo vi ellernos nian lingvon.

Vane li parolis, la knabino ne tro komprenis lin.

Ekde tiu ĉi tago ili ĉiam estis kune. La knabo instruis al ŝi la lingvon.

La knabino estis belega, blondharara kaj ŝi havis helbluajn okulojn, kiuj ĉarmis lin.

En la koro de la knabo ekflagris la amo. Tage kaj nokte li revadis pri la knabino.

Li instruis al ŝi ĉiutage novajn vortojn kaj esprimojn. La knabino estis eminenta lernantino. Ŝi rapide lernis kaj post kelkaj semajnoj ŝi povis diri simplajn frazojn. „Mi estas knabino. Vi estas knabo. Vi havas belajn okulojn. Vi plaĉas al mi. k.t.p.”

Ili ambaŭ estis kontentaj kaj ili ridis multe dum la lernohoroj.

En iu posttagmezo, kiam jam estis preskaŭ vespero ili sidis sur benko. Ili estis mutaj kaj rigardis la ĉielon. La knabino subite demandis:

— Kion vi instruas al mi hodiaŭ?

La knabo respondis nenion. Li ĉirkaŭbrakumis ŝin kaj kun varma sento kisis la buŝon de la knabino.

Ŝin surprizis la kiso, sed post iom da tempo ŝi diris kontente:

— Ĝis nun ĝi estis la plej bona lernohoro. Bonvolu ripeti por ke mi perfekte ellernu la lecionon!

— Ŝaŝa —



*Ĥristina Kozlovska*

## Pri lacerto kaj ĝia vosto

Iam varmegan someran tagon lacerto alkuris al monta fonto por malvarmiĝi. Ĝi rampis sur la randan ŝtonon, tre longe rigardis la akvon, kaj subite akra doloro penetris ĝian tutan korpon. La lacerto faris abruptan movon por eskapi, sed ne povis. Ĝi ĉirkaŭrigardis kaj ekvidis la okulojn de linko, terurajn, brilantajn okulojn. Dume ĝiaj akraj ungegoj eniĝis en la voston de la lacerto, kiu eĉ pensis, ke morto jam venis por ĝi, sed ĝi tamen ĝustatempe pripensis, forlasis sian voston kaj forkuris tiel rapide kiel ĝi nur povis.

Ĝi kuregis el ĉiuj siaj fortoj, sen retrorigardi, sen pensi pri io ajn. Ĝi ĵetis sin en la plej dikajn densejojn, malsekajn rosajn herbojn, pikajn domojn, glitis laŭ muskoj, ruliĝis sur deklivoj malsupren, grimpis supren laŭ nudaj rokoj, ĝis alkuris tiom malproksimen, ke ĝi eĉ ne sciis, kien ĝi trafis, ĝi enfosiĝis en sekkan susurantan foliaron kaj komencis respiri fiksaŭskultante. Tiel, aŭskultante la silenton kaj fikse rigardante la mallumon, ĝi sidis dum io m da tempo ĝis konvinkiĝis, ke nenio minacis ĝin. Ĝuste tiam ĝi finfine elrampis, duonfermante la okulojn pro la taga lumo kaj ĝuante freŝecon de la aero. La lacerto trotetis per siaj etaj kruroj serĉante ĝermojn de plej ŝatataj de ĝi plantoj kaj krakeblajn formikojn. Tiel pasis la tago, kaj la alia pasis, tiel pasis multaj tagoj, la lacerto kreskigis novan voston: ŝajnus, ke ĝi povus vivi kaj ĝoji, sed ne - kun ĉiu pasanta tago la lacerto iĝis ĉiam pli malĝoja kaj pli malgaja. Ĝi rigardis sian novan voston, kaj tiu ŝajnis esti ne tiel bona kiel la malnova, ne tiel forta, kaj makuloj sur ĝi ne estis tiel brilaj kiel sur la malnova. La penso pri tio ne lasis ĝin en trankvilo, la lacerto endormiĝis kaj vekigis kun ĝi. Kaj unu tagon ĝi tamen trovis en si kuraĝon, komence ĝi rampis malrapide kaj malcerte en la direkton, de kie ĝi nur ĵus estis forkurinta, poste ĝi plirapidigis sian iradon, ĝis ĝi komencis kuri. Ĝi kuris, plena de firmeco repreni sian malnovan voston kaj samtempe plena de glaciiga timo al tiu besto, kiu apenaŭ murdis ĝin.

Kaj jen la lacerto estas proksima al tiu fonto, ĝi metis jam unu piedon sur ŝtonon, sed tiam ekaŭdis krakon de sekaj branĉoj malantaŭe, la lacerto ekstremis pro timo kaj forkuris de tie kiel eble plej foren, ĉar ĝi sciis ke la linko ŝteliris al ĝi. Denove la lacerto forkuris, kaj forkurante, promesis al si neniam plu reveni tien, neniam plu dum sia vivo. Pasis io m da tempo, kaj denove pensoj pri la malnova vosto komencis turmenti la lacerton, denove la mondo estis malfavora por ĝi, kiam ĝi

rigardis la novan malŝatatan. Kaj denove la lacerto kuraĝis reveni por la malnova vosto, sed tiutempe ĝi intencis ne atenti ajnajn danĝerojn.

Eĉ demalproksime la lacerto ekvidis la fonton, trovis kuraĝon kaj ĵetis sin antaŭen. Nur eĉ la lago, respirante, ĝi komencis ĉirkaŭrigardi, sed nenie vidis sian voston. Tiam la lacerto paŝis sur la bordon de la lago kaj rigardis en la akvon: jes, ĝi estas tie, en la akvo, ĝia malnova vosto, tiel bela, tiel kara. Ĝuste nun ĝi elprenos sian voston, forĵetos la novan voston kaj kunprenos la malnovan. La lacerto admiris ĝin, rigardante en la akvon, kaj ne povis admire kontentiĝi. Restis nur elpreni ĝin. La lacerto ĵetis sin en la akvon, sed nur kiam ĝi atingis la fundon, ĝi komprenis, ke tio ne estis ĝia malnova vosto en la akvo, sed reflekto de la nova. Nun restis nur eliĝi el la profunda lago sur la landon, kie la linko estis jam atendanta ĝin.

*(Elukrainigis Petro Palivoda)*

*Tradukite laŭ la eldono: Христина Козловська, Ящипка ма її хвіст, Discursus, 2018*



*Ĥristina Kozlovska*



# Poezio

Preskaŭ ĉiutage mi legas versojn. Hungarlingve kaj en Esperanto. Al mia vivo apartenas la poemo.

Verdire la nuna homo ne ŝatas legi ĝin. Poezio en la okuloj de multaj homoj estas nur tolerebla literaturaĵo.

Malgraŭ tio mi diras: LEGU ĈIUTAGE VERSOJN! Ĉefe post la legado, meditu pri ĝia enhavo, kion ĝi mesaĝis al vi, pri kio instruis vin la legita verso.

OOOOOOOOOOOOOOOOOOOOOOOOOOOOOO

OOOOOOOOOOOOOOOOOOOOOOOOOOOOOOOOOO

Ivaniĉka Maĝarova

## BORDO

Kruta bord'  
luna nokt'  
kaj virin'  
ĉe la bord'.  
Ŝi atendas.  
Remas li  
al la bord'.  
Silenta nokt'.  
Atendas ŝi  
ĉe la bord'  
en luna nokt'.  
Venos li.  
Atendas ŝi.  
Nun remas li  
en la nokt'  
al la bord'.  
Atendas ŝi  
en blanka nokt'.  
Sed ĉu ne  
bela nokt' ?  
Piedas ŝi  
sur la bord'.  
kaj en nokt'

nur silent'  
nek sono  
de remil'.  
Atendas ŝi.  
Atendas ŝi  
en blanka nokt' !  
Kruta bord,  
sen remuloj  
estas nokt'  
Paŝoj ree  
sur la bord'.  
Paŝas ŝi  
paŝas  
paŝas  
Ŝi.

## Simio kaj Spegulo

Maljuna simio  
pri spegulo miris  
sed sin ekvidinte  
serioze diris:

"Ĉio do senduba,  
for mensogo-lulo -  
ĝis nun mi ne vidis  
pli turpan estulon!

Haroj ĉiuflanke,  
korpo aĉe vila!  
Mi al ĝi di-danke  
estas nulsimila!"

(Jovan Jovanović - Zmaj) esperantigis Новаков  
Живанко



# Por infanoj



## Veroj kaj mensogoj

Estis bela somera tago. Avino Mara sidis komforte kliniĝanta en sia ĝardenofotelo kaj pacience atendis alvenon de sia nepino, Ana.

La pasintan semajnon ŝi promesis al Ana ke ŝi estu preta aŭskulti ŝin por helpi ŝin kompreni nin plenkreskulojn.

Ana estis dekjarulino, infane scivolema kaj nepre afabla.

— Same ŝi estas akurata - ekpensis Avino Mara, aŭdinte la pordosonorilon.

— Estas deka kaj duono matene. Mi venas ĝustatempe - Ana diris kun rido de buŝo al oreloj.

— Eniru ĉambron! Ni iros al florigardeno por trankvile interparoli.

Bonvolu preni vian porcion de glaciaĵo - diris Avino Mara. La nepino kisante la vangojn de avino Mara sidiĝis en fotelo tie troviĝanta.

Estas bele ĉe vi avinjo. Vin ĉirkaŭas beleco kaj nia temo pridiskutonta estas malagrabra - diris Ana scivole rigardanta ĉirkaŭen.

— Jes, kara mia. Afablaj vortoj pli efikas ol admonoj. Mi konsilos vin miapove - diris avino Mara - aldonante - do vi diris ke vin embarasigis sciigo ke malvero milfoje eldirita fariĝos vero. .... La avino faris paŭzon rigardante rekte en la okulojn de Ana.

Jes, avinjo. Hieraŭ mi legis tion en gazeto. Same mi ofte aŭdas tian diraĵon..

— Mensogi estas ne diri la veron. Kaŝi la veron ja estas multaj kialoj, kial homoj decidas aŭ elektas mensogi. Kara mia unue vi devas scii, ke mensogo estas malbela homa virto. Due, almenaŭ ĉiu mensogas.

— Sed vi diris ... haltigis ŝin la avino Mara - Jes kara, estas malgrandaj mensogoj aŭ bagatelaj mensogoj kiuj al neniu faros domaĝon.

Vidu, la infanoj nekonscie mensogas kaj ni kutime ridas al iliaj mensogoj.

— Jes, mi komprenas kiel ili kreskiĝas, ekscios la diferencon inter mensogo kaj vero.

Bone, sed iam homoj mensogas pro superstiĉoj.

— Jes, ili ne volas esti malbonŝancaj kiel fiŝkaptisto aŭ onklo kiu estas studento kiam li iris por ekzameniĝi ...-gaje aldonis Ana.

— Veras. Estas multaj tiaj superstiĉaj situacioj sed tiuj mensogoj estas senpekaj.

— Ho, samkiel mi mensogis mian kamaradinon ne dirante al ŝi la veron je ŝia demando ``Kien vi iras?``Mi deziris esti sola kun vi, tial mi mensogis - klarigis Ana la kialon de sia mensogo.

— Jes. Vidu kiel tio estas senpeka mensogo - diris avino Mara aldonante.

Same estas al homoj pli facile mensogi ol klarigi al iu siaj privataj kialoj. Multaj homoj ne volas konfronti aŭ diskuti aŭ volas nur ŝpari la tempon, ĉu ne? - diris laŭte la avino Mara.

— Aha - konvinkita diras Ana.

— Vere, vi pravas avinjo.

Sed estas multaj mensogoj pri la pli grandaj aferoj, ekzemple rilate al drogoj, al rabado, al mortigo al ŝtelado al ... fine al justeco.

— Jes, respondis avino. Ne forgesu ĉi tion - ``LA GRANDAJ MENSOGOJ ESTAS MENSOGOJ SAME LA PEKOJ SED ĈIUJN ONI DEVAS ESTI SERĈITAJ, PRUVITAJ POR KE ONI NE AKUZU IUN MENSOGI SEN PRUVOJ!.

— Do, ĉiuj mensogoj ne meritas la vangon, bastonbatojn, punon, admonon. Ili ĉiuj nomiĝas MENSOGOJ. Severaj aŭ malpli severaj oni bezonas pruvojn por ke oni kiuj mensogas estu punita laŭmerite.

— Jes. Nun mi komprenis. NENIA GRANDA MENSOGO POVAS FARIĜI VERO. Neniu peko povas esti senkulpa. Peko estas ĉiam peko.

— Veras, mia kara. Vi estas saĝa knabino -diris la avinjo tenere tenante la manon de la nepino.

— Estas senfina nombro de stultuloj kiuj akceptas, ke multfoje ripetita mensogo fariĝos vero, ĉar stultuloj ĉiam trovas pli grandan stultulon kiu lin admiras.

FINO

Verkis la 5an de julio 2018 Miriĉ Jadranka  
/Zajeĉar /Esperanto klubo Generala Gambete 82  
/Serbio



# Somero

# Somero

